# *La japana ?efministro vizitas Kubon.*



Shinzo Abe, ?efministro de Japanio, alvenis al Kubo por plenumi oficialan laborviziton. Li estas la unua japana ?testro kiu vizitas Kubo kaj estos akceptita de la kuba prezidento Raúl Castro, amba?  efektivigos ampleksan laborprogramon en la insulo.

Anta? ol alveni, la ?efministro esprimis al la kuba gazeto *Granma* sian deziron okazigi malferman dialogon pri diversaj temoj kiuj inkluzivas la impulson de komerco kaj investoj en la kariba lando.

Li aldonis ke la intenco estas esprimi al la prezidento Raúl Castro, ke Japanio da?re klopodos agadi favore al la ekonomia kaj socia progreso de Kubo.

Amba? landoj subskribis la pasintan 19-an de septembro, interkonsenton por reordigi siajn ?uldojn je meza kaj longa periodo kun la celo plifortigi siajn rilatojn en la sektoroj ekonomia-komerca, investoj kaj kunlaboro.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/106546-la-japana-cefministro-vizitas-kubon

**Radio Habana Cuba**